


S-no Haudebine
23bis Rue du Télégraphe
75020 Paris

Paris 30/12/77

Karaj Amikoj,

Kiom longe mi ne skribis al vi! Kiel kutime okupiteco malpermesis tion al mi, bedaŭrinde. Tial mi klopodos nun koncize informi vin pri miaj okazaĵoj de post la komenco de 1976, kiu estis tre okupata.

En februaro mi vojaĝis tra Danlando por paroladoj pri Hindujo, kun diapozitivaj kaj malgranda ekspozicio pri tiu lando. De tie mi pluvojaĝis al Hago por preparoli seminarion pri la Cseh-metodo en Ateno, antaŭ ol iri al Belgujo por viziti amikan familion. Kelkajn tagojn poste mi revenis al Francujo kaj, en aprilo, partoprenis la ĝeneralan kunvenon de la Svisa Esperanto-Societo kaj kunvenon de la grupo en Zurich kun mia programo pri Hindujo.



Meze de aprilo mi reestis en Parizo, kie mi loĝis ĉe bonkora samideano, kiu pruntis al mi neokupitan loĝejon ĝis mi, finfine, ricevis propran loĝejon proksime al la alia. Pro tio, dum oni riparigis ĝin, mi ofte tien transportis pakaĵojn ĝis la 12-a de junio, mi ĝojis ekesti en mia hejmo, kiun mi, iom post iom, instalas.

Komence de aŭgusto mi gvidis la seminarion en Ateno. De tie mi vojaĝis al Hindujo. En la daŭro de tri monatoj mi klopodis, vane, finaranĝi la informilon de UEA, por Hindujo kaj apudaj landoj; sed el la kvin diverslingvaj tradukoj, mi ne sukcesis ricevi pli ol du presprovaĵojn. Por la tri aliaj mi havis promeson de la juna sekretario de la Hinda Esperanto-Instituto, ke li donos ilin al mi, kiam mi revenos el la sudo.

El New Delhi mi iris al la centra urbo Indore, kie mi restis semajnon. Tie, por helpi profesoron, kiu lernis Esperanton pere de mia koresponda kurso, mi faris paroladojn en pluraj kolegioj kaj aparte instruis liajn familianojn. Plie mi ĉeestis la fondiĝon de studenta klubo antaŭ mia foriro.

El Indore mi iris pli suden, al Bangaloro, kie akceptis min paro, ankaŭ gelnintoj de mia koresponda kurso. Dum unu monato, el ilia apuda vilaĝo, mi iris 7 fojojn al Bangaloro, kun ili, por preparoli paroladojn aŭ paroladi pri Esperanto en kolegioj kaj altlernejoj. La rezulto estis 4 paroladoj en Bangaloro kaj 2 en Whitefield, kie mi gvidis kurson por 9 geknaboj kaj helpis miajn gastigantojn per tradukado.

El New Delhi mi iris al la centra urbo Indore, kie mi restis semajnon. Tie, por helpi profesoron, kiu lernis Esperanton pere de mia koresponda kurso, mi faris paroladojn en pluraj kolegioj kaj aparte instruis liajn familianojn. Plie mi ĉeestis la fondiĝon de studenta klubo antaŭ mia foriro.

El Indore mi iris pli suden, al Bangaloro, kie akceptis min paro, ankaŭ gelnintoj de mia koresponda kurso. Dum unu monato, el ilia apuda vilaĝo, mi iris 7 fojojn al Bangaloro, kun ili, por preparoli paroladojn aŭ paroladi pri Esperanto en kolegioj kaj altlernejoj. La rezulto estis 4 paroladoj en Bangaloro kaj 2 en Whitefield, kie mi gvidis kurson por 9 geknaboj kaj helpis miajn gastigantojn per tradukado.

Reveninte al New Delhi, ĉe geamikoj, mi esperis ricevi la 3 promesitajn presprovaĵojn... Vane! La sekretario de HEI libertempis por tuta monato, precize tiam, kiam li sciis, ke mi baldaŭ reiros al Parizo!!!

Dum du semajnoj mi ordigis gazetartikolojn pri diversaj hindaj temoj, kaj preparis pakaĵojn por sendi ilin al mia adreso. Krome mi klopodis akiri reirbileton, ĉar mi intencis pagi ĝin per mono pruntita de mia amiko por repagi al lia filo en Francujo. Ankaŭ tio estis vana, ĝis mi fine ricevis senpage bileton, repagota en Parizo post ricevo de la fakturo. Mi reestis hejme meze de novembro kaj ĝis la fino de la jaro vizitis familianojn kaj infantempan amikinojn. Tiel pasis unu tuta jaro!

Reveninte al New Delhi, ĉe geamikoj, mi esperis ricevi la 3 promesitajn presprovaĵojn... Vane! La sekretario de HEI libertempis por tuta monato, precize tiam, kiam li sciis, ke mi baldaŭ reiros al Parizo!!!

Dum du semajnoj mi ordigis gazetartikolojn pri diversaj hindaj temoj, kaj preparis pakaĵojn por sendi ilin al mia adreso. Krome mi klopodis akiri reirbileton, ĉar mi intencis pagi ĝin per mono pruntita de mia amiko por repagi al lia filo en Francujo. Ankaŭ tio estis vana, ĝis mi fine ricevis senpage bileton, repagota en Parizo post ricevo de la fakturo. Mi reestis hejme meze de novembro kaj ĝis la fino de la jaro vizitis familianojn kaj infantempan amikinojn. Tiel pasis unu tuta jaro!

Komence de 1977 mi imagis havi trankvilan tempon... sed mi ricevis leteron de S-ino Saghafian, la irana sinjorino, kiu volis perfektigi en Esperanto kaj petis mian helpon. Ŝi intencis resti unu monaton en Parizo. Tamen, alveninte fine de januaro, meze de februaro ŝi decidis lerni dum 3 monatoj. Dume mi devis zorgi pri ŝia lernado kaj doni al ŝi informojn kaj direktivojn, tiel ke ŝi povu, laŭ ŝia decido, instrui en Teheran pere de la Cseh-metodo. Kaj ŝi restis en Parizo ĝis la fino de majo.

Intertempe, laŭ antaŭa aranĝo, mi iris al Germanujo por paroladoj pri Hindujo en diversaj urboj. Por S-ino Saghafian, mi aranĝis, ke dum mia foresto, ŝi restadu en esperanta franca familio en la centro de la lando. Tiamaniere ŝi akiris sperton, kiel poste, kiam mi zorgis por ŝi pri kelktaga restado ĉe amikinoj en Danlando kaj Svedujo, survoje al la Internacia Lernejo en Elsinoro.

Antaŭ tio, komence de majo, alvenis amikino de S-ino Saghafian, edzi-

Komence de 1977 mi imagis havi trankvilan tempon... sed mi ricevis leteron de S-ino Saghafian, la irana sinjorino, kiu volis perfektigi en Esperanto kaj petis mian helpon. Ŝi intencis resti unu monaton en Parizo. Tamen, alveninte fine de januaro, meze de februaro ŝi decidis lerni dum 3 monatoj. Dume mi devis zorgi pri ŝia lernado kaj doni al ŝi informojn kaj direktivojn, tiel ke ŝi povu, laŭ ŝia decido, instrui en Teheran pere de la Cseh-metodo. Kaj ŝi restis en Parizo ĝis la fino de majo.

Intertempe, laŭ antaŭa aranĝo, mi iris al Germanujo por paroladoj pri Hindujo en diversaj urboj. Por S-ino Saghafian, mi aranĝis, ke dum mia foresto, ŝi restadu en esperanta franca familio en la centro de la lando. Tiamaniere ŝi akiris sperton, kiel poste, kiam mi zorgis por ŝi pri kelktaga restado ĉe amikinoj en Danlando kaj Svedujo, survoje al la Internacia lernejo en Elsinoro.

Antaŭ tio, komence de majo, alvenis amikino de S-ino Saghafian, edzino de la "motoro" en Irano, S-ro Saheb-Zamani. Ĉiutage ili venis kune, unu por lerni, la alia por aŭskulti. Tiel ĝis la foriro de S-ino Saghafian, kiam S-ino Saheb-Zamani mem lernis ĝis la fino de junio.

Tio signifas, ke dum 5 monatoj, ĉiutage posttagmeze, mi estis okupata de la 3a ĝis la 6a principe, ĉar ofte S-ino Saghafian restis ĝis la 7a, aŭ pli, eĉ foje ĝis la 8a45... ĉiam pro helpo al ŝi pri skribota letero, preparo de irado tra Parizo pro diversaj kaŭzoj, ktp. Plie, ĉiun vesperon ni korektis ŝiajn respondojn rilate al lecionoj de mia koresponda kurso, kiun ŝi tre ŝatis, ofte ĝis tre malfrue nokte. Kaj la postan matenon, kompreneble mi devis prizorgi mian hejmon, aĉetojn kaj kuiradon, kaj esti preta posttagmeze, kun "freŝa" menso. Tiuj 5 monatoj tre lacigis min.

no de la "motoro" en Irano, S-ro Saheb-Zamani. Ĉiutage ili venis kune, unu por lerni, la alia por aŭskulti. Tiel ĝis la foriro de S-ino Saghafian, kiam S-ino Saheb-Zamani mem lernis ĝis la fino de junio.

Tio signifas, ke dum 5 monatoj, ĉiutage posttagmeze, mi estis okupata de la 3-a ĝis la 6-a principe, ĉar ofte S-ino Saghafian restis ĝis la 7-a, aŭ pli, eĉ foje ĝis la 8a45... ĉiam pro helpo al ŝi pri skribota letero, preparo de irado tra Parizo pro diversaj kaŭzoj, ktp. Plie, ĉiun vesperon ni korektis ŝiajn respondojn rilate al lecionoj de mia koresponda kurso, kiun ŝi tre ŝatis, ofte ĝis tre malfrue nokte. Kaj la postan matenon, kompreneble mi devis prizorgi mian hejmon, aĉetojn kaj kuiradon, kaj esti preta posttagmeze, kun "freŝa" menso. Tiuj 5 monatoj tre lacigis min.

Fine de majo mi partoprenis en Grenoble la francan kongreson, akompanata de S-ino Saheb-Zamani kiu poste forlasis Parizon. Ankaŭ ŝi, kun fratino, partoprenis la restadon en Elsinoro. Ilin mi poste retrovis, kun S-ino Saghafian, en Rejkjaviko.

Intertempe mi estis alvokita por kurseto en Artigues, apud Bordeaux, kie okazis en julio kunveno prepare al la "RIDEF" en Portugalujo.

Por atingi Rejkjaviko per iĝi flugmaŝino mi iris al Luksemburgo, sen mia flugbileto, kiu mistere perdiĝis en Francujo. Feliĉe amiko bone sukcesis, ke mi havu duplikaton. Tamen ni ne povis atingi nian aviadilon, ĉar estis tro strikta tempo. Kaj la posta aviadilo havis teknikan difekton! Necesis resti tie ĝis la posta tago, kun multaj aliaj vojaĝantoj, lokitaj de la flugkompanio en bona hotelo. Fine ni atingis Rejkjavikon sufiĉe frue por povi partopreni la konatiĝan vesperon.

Fine de majo mi partoprenis en Grenoble la francan kongreson, akompananta de S-ino Saheb-Zamani kiu poste forlasis Parizon. Ankaŭ ŝi, kun fratino, partoprenis la restadon en Elsinoro. Ilin mi poste retrovis, kun S-ino Saghafian, en Rejkjaviko.

Intertempe mi estis alvokita por kurseto en Artigues, apud Bordeaux, kie okazis en Julio kunveno prepare al la "RIDEF" en Portugalujo.

Por atingi Rejkjaviko per flugmaŝino mi iris al Luksemburgo, sen mia flugbileto, kiu mistere perdiĝis en Francujo. Feliĉe amiko bone sukcesis, ke mi havu duplikaton. Tamen ni ne povis atingi nian aviadilon, ĉar estis tro strikta tempo. Kaj la posta tago, kun multaj aliaj vojaĝantoj, lokitaj de la flugkompanio en bona hotelo. Fine ni atingis Rejkjavikon sufiĉe frue por povi partopreni la konatiĝan vesperon.

Dum tiu kongreso, kiel en Ateno la pasintan jaron, mi gvidis seminarion pri la Cseh-metodo. Sed tiun ĉi jaron mi povis havi plurajn "kobajojn", tio estas nesciantoj de Esperanto, al kiuj mi donis specialajn lecionojn tiel, ke la seminarianoj vidu la manieron instrui la malfacilajn punktojn de la kurso kaj rimarku la reagojn de la lernantoj. Tio estas pli efika ol nur teoriaj informoj kaj simplaj demonstracioj.

Dum tiu kongreso, kiel en Ateno la pasintan jaron, mi gvidis seminarion pri la Cseh-metodo. Sed tiun ĉi jaron mi povis havi plurajn "kobajojn", tio estas nesciantoj de Esperanto, al kiuj mi donis specialajn lecionojn tiel, ke la seminarianoj vidu la manieron instrui la malfacilajn punktojn de la kurso kaj rimarku la reagojn de la lernantoj. Tio estas pli efika ol nur teoriaj informoj kaj simplaj demonstracioj.

La tagon post mia reveno el Rejkjaviko mi foriris al Gresillon, la kastelo de la francaj esperantistoj, por ripozi tutan semajnon. Denove hejme mi vizitis mi vizitis familianojn diversloke ĉirkaŭ Parizo. Kaj meze de oktobro mi vojaĝis al Belgujo por ĉeesti la 75-jaran jubileon de la grupo en Bruĝo, la unua en Belgujo- Tiam mi denove vizitis mian belgan amikan familion antaŭ ol reveni hejmen.

La tagon post mia reveno el Rejkjaviko mi foriris al Gresillon, la kastelo de la francaj esperantistoj, por ripozi tutan semajnon. Denove hejme mi vizitis mi vizitis familianojn diversloke ĉirkaŭ Parizo. Kaj meze de oktobro mi vojaĝis al Bejgujo por ĉeesti la 75-jaran jubileon de la grupo en Bruĝo, la unuan en Belgujo- Tiam mi denove vizitis mian belgan amikan familion antaŭ ol reveni hejmen.

Mia lasta vojaĝo okazis fine de novembro, kiam mi iris al La Chaux-de-Fonds, en Svisujo, por dutaga seminario. Antaŭ ol foriri mi povis viziti la tre interesan Centron de Dokumentado kaj Studo pri la Internacia Lingvo.

Kaj tiu jaro 1977 atingos baldaŭ sian lastan minuton...
Pro tio mi plej kore deziras, ke vi restu sana la venontan jaron, kaj, ke ŝi alportu al vi ĉion deziratan de vi. Gojon kaj feliĉon!
Kun tre amikaj salutoj.

Mia lasta vojaĝo okazis fine de novembro, kiam mi iris al La Chaux-de-Fonds, en Svisujo, por dutaga seminario. Antaŭ ol foriri mi povis viziti la tre interesan Centron de Dokumentado kaj Studio pri la Internacia Lingvo.

Kaj tiu jaro 1977 atingos baldaŭ sian lastan minuton...

Pro tio mi plej kore deziras, ke vi restu sana la venontan jaron, kaj ke ĝi alportu al vi ĉion deziratan de vi. Ĝojon kaj feliĉon:

Kun tre amikaj salutoj.

Kun tre amikaj salutoj.

Pardonu, ke mi ne povas
skribi al vi nun -

Tion kaŭzas miaj sanstato,
kaj devigis min eniri hospitalon.

1978 estu favora al vi kaj
al nia familio.

Sanon kaj sukceson!

Amike

Attila Andelina

Attila Andelina

Provizora adreso:
Hôpital Tenon
(rue Behier, lit n°5)
4 Rue de la Chine
75020 Paris